A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

N-ro 1/2017 (262)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




*Tradicia Silvestro en Česká Třebová 29.12.2016*

Tisk a distribuci tohoto časopisu finančně podpořil Kraj Vysočina

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz - sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

### Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidanto:** Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumbazo, kontado)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

# Estimataj gesamideanoj,




permesu al mi saluti vin okaze de la jaro 2017 – Zamenhofjaro, kiu estas grava por ni ĉiuj, ĉar en tiu ĉi jaro estos en aprilo la centa morto-datreveno de L. L. Zamenhof, kreinto de nia komuna lingvo, kaj en junio estos la 130-a datreveno de la eldono de la unua lernolibro de Esperanto. Sed la jaro 2017 estas grava ankaŭ por mi mem, ĉar temas pri mia unua jaro kiel prezidanto de ĈEA.

Mi scias, ke ne ĉiuj el vi konas min, do mi mallonge prezentos min al vi. Mi naskiĝis en la jaro 1973, loĝas en la vilaĝo Bohutín kaj kun Esperanto mi konatiĝis danke al mia patro, kiam mi estis sesjara. Mi partoprenis kun li E-aranĝojn en nia ĉirkaŭaĵo kaj komencis lerni Esperanton, ĉar min ĝenis, ke mi ne komprenas, kion la homoj diras. Komence mi ne estis tre diligenta lernantino, sed ekde miaj proksimume dekkvin jaroj mi lernis kun firma ideo sukcesi, kaj ŝajne sukcesis, tamen ĉiam estas io por lerni. Mi studis ĉe gimnazio en Šumperk kaj poste ĉe Social-jura akademio en Brno. Mi laboras kiel oficisto de Dungo-oficejo de Ĉeĥa Respubliko. Antaŭ nelonge mi finis studon de sociala laboro ĉe Palacký-Universitato en Olomouc kaj nun mi tie studas pedagogion kaj socialan laboron en magistra studprogramo. Por Esperanto mi klopodas aktive labori en la E-klubo en Šumperk; en pasinteco mi estis estrarano de ĈEA, komitatano A de UEA, al kiu funkcio mi revenis, kaj laŭ la eblecoj mi partoprenas en enlandaj kaj eksterlandaj E-aranĝoj.

Sed ne nur tiu ĉi jaro – jaro de Zamenhof – estas grava por la E-movado en Ĉeĥio. Tuj kiam oni alparolis min kandidatiĝi por la posteno de la prezidanto, mi pensis al tio, ke en la jaro 2018 estos 10-a jubileo de fondiĝo de nia Esperanto muzeo en Svitavy kaj en la jaro 2019, kiam finiĝos mia periodo kiel prezidanto de ĈEA, estos 50-a datreveno de la fondiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Mi decidis tamen kandidatiĝi kaj mi pensas pri tio, ke ni devas digne festi tiujn ĉi datrevenojn. Mi, kun miaj kunlaborantoj en la estraro, kompreneble klopodas kaj klopodos prepari aranĝojn rilate al tiuj jubileoj. Kiel ekzemplon mi povas mencii aranĝon „Muzea nokto“ en la Esperanto–muzeo en Svitavy kun riĉa programo, pri kiu vi povas legi pli en alia loko de tiu ĉi numero de Starto kaj al kiu mi elkore invitas vin nome de ĈEA kaj de la Muzea kaj ekspozicia grupo.Tamen mi petas vin ĉiujn, ne hezitu diri, skribi aŭ alimaniere esprimi al ni viajn proponojn, ideojn, instigojn por dece festi tiujn ĉiujn jubileojn. Via helpo estas dezirata kaj bonvena.

Fine de mia alparolo al vi mi ankoraŭ unufoje deziras al vi ĉion bonan kaj multe da sano en Zamenhofjaro 2017, kaj dankas al mia komitata skipo, ke ili decidis kunlabori kun mi.

*Libuše Hýblová*



***Zamenhof-jaro***

*L. L. Zamenhof*
*15.12.1859*
***14.4.1917***

# Raporto pri aktiveco de organizaj unuoj de ĈEA

en periodo ekde la Anstataŭa 15-a Kongreso ĝis la 16-a Kongreso (novembro 2015 ĝis oktobro 2016) prezentita dum la 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov

## 1. KLUBOJ

La stato kompare kun 2015 estas konstanta. Adresaro en esperanto.cz estas aktualigata laŭ alvenintaj raportoj. La kluboj havas **diversan juran postenon** – plene memstaraj (Pardubice, Prostějov, Svitavy, Třebíč), memstaraj kun statuto komuna kun ĈEA – ĉeĥlingve t.n. pobočné spolky (Brno, Praha, Ústí n./L. en diversaj etapoj de reregistriĝo), la ceteraj ne havas juran personecon. 20 kluboj realigas almenaŭ partan agadon, ses ekzistas nuntempe pli malpli formale.

Ekde la lasta kongreso en 2015 la ekziston oficiale ĉesigis kluboj en Hradec Králové kaj Moravské Budějovice. – En 7 urboj sen kluboj en la adresaro funkcias **regionaj delegitoj.**

**Regulajn kunvenojn (almenaŭ unufoje monate kun instruado aŭ prelega programo)** anoncis Praha, Brno, Pardubice, Svitavy, Šumperk, M. Boleslav, Č. Třebová, Pelhřimov, Benešov, Ostrava, Havířov, Olomouc, Hranice, Ústí n. L.; regulaj kunvenoj (precipe konversaciaj, informaj aŭ laboraj) okazas en Přerov, Prostějov, Plzeň, Opava, Tábor. Neregulajn kunvenojn kutime kun kultura programo realigas Písek.

La kluboj funkcias en **diversaj spacaj kondiĉoj**: en klubejo kontraŭ lupago (Brno), en privataj loĝejoj (Pardubice, Hranice, Tábor, Opava), en restoracioj (Pelhřimov, Šumperk, Č. Třebová, Písek). Kelkaj uzas senpage ejojn de aliaj institucioj (memstara klubo Svitavy – Esperanto-Muzeo, en kies funkciado ĝi partoprenas, Praha – klubejo de la urbestraro Praha 1, Ústí n.L. – Euroclinica, Havířov – kulturdomo). – Pozitiva faktoro rilate publikan videbliĝon: kelkaj uzas senpage klubejojn de aliaj asocioj, kies parto ili samtempe estas, aŭ la membroj havas duoblan membrecon (Ostrava – klubo de turistoj, Benešov – komunumo de senioroj, Olomouc – Patrujscienca societo). Klubo M. Boleslav en 2016 sian klubejon perdis (kaj komence de 2017 reakiris).

**Ĝeneralaj problemoj kaj tendencoj**: precipe malkresko de la membrobazo, nesufiĉa aktiveco de la membraro, socia fermiteco, nesufiĉo da financoj, altiĝanta aĝstrukturo (kio estas komuna por multaj libertempaj institucioj ekster Esperantujo, kiuj ne ĉerpas el subvenciaj programoj).

**Eksterlandaj kontaktoj** okazas plejparte sur persona nivelo, sed sur kluba nivelo, malgraŭ eblecoj de interreto ili estas bedaŭrinde velkantaj (esceptoj estas ekz. Mladá Boleslav, Svitavy – kontaktoj kun Ĉinio, Česká Třebová – klubo en Schwerin, Ostrava – klubo en Bielsko-Biala k.a.). Individuaj vizitantoj el eksterlando en 2016 modere kreskis, grandparte dank' al UKo en Nitra. Kelkloke oni bone utiligis tion por informado en la loka gazetaro (ekz. Benešov). Kelkaj kluboj aktive partoprenis en zorgo pri eksterlandaj gastoj kadre de la ĈEA-aranĝoj (ekz. Antaŭkongreso – kluboj Svitavy kaj Olomouc, aranĝo de Sekcio de nevidantoj en Poděbrady –

kluboj Poděbrady kaj Ostrava). – En pluraj kluboj kelkaj membroj de la kluboj **membras, ev. aktivas en aliaj Esperanto-organizoj** (ekz. Česká Třebová kaj Hranice – IFEF, Pardubice, Mladá Boleslav kaj Moravské Budějovice – AEH, Přerov – IKUE, Olomouc – Sekcio de nevidantoj, **Prago – E-mental' kaj Ĉeĥa E-Junularo**).

En la laste menciita okazas depost 2015 rejuniĝo, reviglîĝo kaj buntigo de aranĝoj, ĝuste dank' al reciproka kunlaboro de la organizoj (precipe dank' al V. Pištíková, "dyktatorino" de la blaga - ŝerca klubo E-mental', kiu membras ankaŭ en la kluba komitato). Plu estas eldonata 3foje jare Praga Bulteno, redaktata de la prezidanto T. Břicháček, kun freŝa alloga enhavo, kun pli abundaj kunlaborantoj (senpage disponebla en la kluba retejo). Plej multaj e-mentalaj aranĝoj, diskonigataj en la Bulteno, malfermitas ankaŭ por nemembroj (ekz. Bestoĝardeno, ekskursoj al Bohemia-Saksa Svislando k.a.). Kunagado kun ĈEJ (precipe kun estro de la praga junulara klubo J. Šebetovský) donas esperon pri generacia kontinueco. Okazis ankaŭ vigligo de internaciaj kontaktoj de Prago, ĉar multaj eksterlandanoj ne kontaktas unue la klubon, sed E-mentalon aŭ V. Pištíková kiel gastiganton de Pasporta Servo.

Bona ekzemplo de la bonfara aranĝo kun eksterordinara ebleco de publika videbligo de Esperanto, organizata far E-mental', estis partopreno en la tutŝtata bonfara aranĝo BRIKO, okazinta en junio 2016 en la urbocentro de Prago (vidu artikolon en Starto 2016/3).

**Publika informa aktiveco** de kluboj: krom pluraj artikoloj en la loka gazetaro okazas tutjare pere de tradiciaj montrofenestroj (ekz. Pardubice, Česká Třebová, Pelhřimov), en Pardubice en 2016 sukcesis ankaŭ informo en la porcivitana urba retejo. Ekzemploj de alispecaj formoj: Ústí n. L. – eldono de kalendareto kun informoj pri Esperanto, Svitavy – eldono de aparta poŝtkarto lige al datreveno de la loka fervojo, Písek – amasa reta distribuado de leteroj kun invitilo por Adventa matineo kune kun aldonaj retligiloj pri Esperanto k.a.

**Uzado de modernaj teknologioj**: atingita pluso de la lastaj 5 jaroj estas, ke ĉiuj kluboj krom Česká Lípa uzas retadreson. Iom post iom kreskas uzado de IT – 9 kluboj, 2 sekcioj kaj ped. komisiono havas proprajn retejojn. Menciindas ekz. nova retejo de EK Brno (M. Kolka) kaj modela enhavriĉa prilaboro de la ĝisnuna (M. Malovec). Ekde la lasta kongreso en la retejo aperis 13 novaj elŝuteblaj prelegoj el klubaj kunvenoj. Plu funkcias klubaj paĝoj en Facebook (Brno, Svitavy), kanalo ĉe Youtube (Písek – nerekta diskonigo de Esperanto pere de videoj el publikaj kulturaj aranĝoj en la regiono, dulingve priskribitaj – en 2016 13 novaj; Svitavy k.a.). Elstarajn specifajn aktivecojn en interreto havas precipe EK Mladá Boleslav. La kluba retejo estas modele kaj regule aktualigata, ankaŭ per ĝeneralaj interesaĵoj.

En www.bezvydavatele.cz disponeblas libroj tradukitaj far J. Drahotová el Esperanto al la ĉeĥa. La klubo prizorgas ankaŭ informan ĉeĥlingvan retejon www.esperanto.wz.cz., kontribuas per meditaj tekstoj en Esperanto al la retejo de la joga klubo *Labutí pírka* kaj per tradukoj de artikoloj el la gazeto *Juna amiko* en la retejo evinatelier.cz.

Ligiloj al la klubaj interretaj retejoj disponeblas en http://www.esperanto.cz/eo/ligiloj/esperanto-en-cxehxio.

**Eldona aktiveco** de la kluboj estis menciita en la ĝenerala raporto (EK Mladá Boleslav, Brno). – Daŭra centro de la agado estas renkontiĝoj kaj konservado de la sociaj kontaktoj de la membroj. Kunagado kaj reciprokaj vizitoj de la klubaj aranĝoj okazas precipe en la regionoj Hanakio kaj Bohemia-Moravia Landlimo.

**Kronologia listo de tradiciaj klubaj aranĝoj por esperantistoj ekde novembro 2015:** 12.12. – Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek kun Adventa matineo destinita ankaŭ por la publiko (denove kun reeĥo en la regiona gazetaro), 29.12. – Esperanta Silvestro en Česká Třebová, 14.5. – Printempa Renkontiĝo de EK Šumperk, ĉi-foje en Velké Losiny, 20.-21.5. – Regiona Renkontiĝo en Bohemia-Moravia Landlimo, ĉi-foje en Polička kaj Svitavy (KPE Svitavy), 4.6.– La 19-a Esperanto-Tago de EK Pardubice, ĉi-foje en la urba kastelo (kun la ĉeftemo *Karolo la Kvara*), 19.6. – Grimpado al Granda Ĉantorio, kun partoprenantoj el Slovakio kaj Pollando (EK Ostrava), 12.-14.8. La 19-a Renkontiĝo de ekstendaranoj en Lančov, kun ekskurso al Bítov (EK Třebíč), 23.9. – La 10-a Postferia renkontiĝo, ĉi-foje en Písek.

Krom jarkunvenoj okazis ankaŭ apartaj neformalaj klubaj aranĝoj (ekz. zamenhofaj kaj kristnaskaj vesperoj en pluraj kluboj, Ovofritaĵo de EK Ostrava (ĉi-foje en Frýdlant n. O.), tendarfajroj (Havířov, Svitavy), konversaciaj-kulturaj posttagmezoj (Písek) k.a.

## 2. SEKCIOJ

Kadre de ĈEA plu funkcias tri sekcioj – katolika, kristana kaj de nevidantoj. La ceteraj jam en la antaŭaj jaroj transformiĝis al memstaraj asocioj (handikapuloj, fervojistoj, junularo).

**1. IKUE-Katolika sekcio** (prezidanto: Miloslav Šváček, vicprezidanto de la tutmonda IKUE). Havas 34 membrojn, kiuj kune kun nemembroj kreas la Ĉeĥan sekcion de IKUE, kiu havas 75 membrojn. Ekde 1990 ĝi eldonas 4foje jare la gazeton *Dio benu* (28 p., nuntempe 160 ekzempleroj), disponeblan senpage en la modela retejo www.ikue.org/cz/. En aŭtuno 2016 okazis reregistriĝo laŭ la Nova civitana leĝaro en kategorio de t.n. pobočný spolek (memstareco kun statuto komuna kun ĈEA). Pluraj membroj partoprenis IKUE-Kongreson en Nitra, kelkaj membroj aktivas en aliaj Esperanto-organizoj. 16.-18.9. okazis ĉiujara renkontiĝo de la sekcio, ĉi-foje en Vranov u Brna, kun partoprenantoj el Slovakio kaj Kroatio.

**2. KELI-Kristana sekcio** (prezidanto: Pavel Polnický, sekretario de la tutmonda KELI) kunigas kristanojn de diversaj konfesioj, kun ekumenisma akcento. En 2016 estis okazanta reregistriĝo laŭ NCL, ankaŭ en la kategorio de t.n. pobočný spolek. La sekcio plu prizorgas printadon kaj distribuadon de la KELI-gazeto *Dia regno*. P. Polnický organizis tutsemajnan KELI-Kongreson Bratislava (en julio 2016), kiun partoprenis pluraj membroj de la sekcio.

**3. Sekcio de nevidantoj** (prezidanto: Jan Příborský) funkcias plu sen propra jura memstareco. La sekcio organizis du kunvenojn: en decembro en Olomouc kaj en aprilo en Prago. Ĝi aktive kunlaboras kun SONS (organizo por nevidantoj). Ĝi

elstaras en aktiva redaktora agado: T. Karaš redaktas kaj plu eldonas 3foje jare la gazeton *Aŭroro* (paralele en Brajla skribo kaj sonformo) kaj J. Jelínek redaktas la gazeton *Esperanta ligilo* (presorganon de la tutmonda LIBE), libere disponeblan en interreto.

Nova esploro montris, ke 8 membroj de LIBE el Ĉeĥio ne membras en ĈEA (la kialoj kaj la koncernaj personoj estas nekonataj – la afero estu plu pritraktota).

Pluraj membroj aktive kontribuis al programo de la 82-a LIBE-Kongreso, okazinta en Nitra post UKo, kie kunvenis partoprenantoj el 12 landoj. Pri la kongreso ili sukcesis aperigi artikolon en la retejo de la Unio de nevidantoj kaj malbonvidantoj de Slovakio.

En 2016 sukcese plu evoluis vigliĝinta kunlaboro kun ĈEA (kontakta persono en la komitato estis Pavla Dvořáková). La membroj kontribuis al prelega kaj kultura programoj de ĈEA-kongresoj (2015-koncerto de geedzoj Jelínek kaj prelego de J. Příborský en Ústí n. O., 2016 – koncerto de geedzoj Karaš en Pelhřimov).

Plu estis prizorgita disponigo de Starto en aparta senbilda html-formo, realiĝis helpo dum alveno de partoprenantoj al LIBE-Kongreso (M. Hruška).

En aŭgusto 2016 la sekcio organizis tutsemajnan renkontiĝon de ĉeĥaj kaj aŭstriaj nevidantaj esperantistoj en Poděbrady (kun aktiva asisto de P. Polnický, J. Čejková kaj J. Dubinová). Sukcese plu daŭris reciproka interŝanĝo de sonregistraĵoj kaj aperigo de pluraj registraĵoj de la sekcio en la muzea paĝo ĉe Ipernity.

Pinto de la kunlaboro estis eldono de la kompaktdisko *Kun kanto ĉirkaŭ la mondo*, kun kantoj registritaj de geedzoj Jelinek kaj Karaš (redaktis kaj prizorgis P.Dvořáková, financis ĉ. 60% ĈEA kaj 40% la sekcio mem).

Ekzemploj de pluaj gravaj aktivecoj de la individuaj membroj de kluboj kaj sekcioj estis menciitaj en la ĝenerala raporto.

## 3. KOMISIONOJ KAJ LABORGRUPOJ

1. Pedagogia komisiono – prezentite en la ĝenerala raporto
2. Laborgrupo por ciferecigado – prezentite en la raporto pri plenumado de la prioritatoj de **1c** kaj **1d**
3. Muzea kaj ekspozicia grupo – prezentite en la raporto pri plenumado de la prioritato **1a**
4. Laborkomisiono por kontrolo de mastrumado (antaŭe kontrola komisiono) – ne estis starigita, sed laŭ la nova statuto povas iam ajn laŭbezone esti denove kreita

## 4. ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY (sen jura memstareco)

- prezentite en la raporto pri plenumado de la prioritato **1a**

*Laŭ la kongresa prezento esperantigis Pavla Dvořáková*

La eldonejo KAVA-PECH estis enskribita en la ĉehan libron de rekordoj kiel eldonejo eksportanta librojn en plej multajn landojn. Pri tio la gazeto *Knižní novinky* (Libraj novaĵoj) faris intervjuon kun Petro Chrdle, la eldonisto.




www.sckn.cz/content/casopis/file-1292.pdf

# INVITO AL KONFERENCO DE ĈEA en 2017

Konferenco de ĈEA okazos ĉi-jare de la 13-a ĝis 15-a de oktobro en la urbo Šternberk situanta en la norda Moravio 20 km de Olomouc.

La urbo, unuafoje skribe menciita en la jaro 1296, estis honorigita per titolo *Historia urbo de la jaro 2008*. Super la urbo staras burgo fondita de Zdislav el Šternberk en la 13-a jarcento. En la urbo estas multaj aliaj historiaj kaj kulturaj memoraĵoj, kiel ekzemple Mariakulta kolono, klostro de aŭgustenanoj, multaj burĝaj domoj el la 18-a kaj komenco de la 19-a jarcentoj kaj Ekspozicio de tempo. Nuntempe Šternberk havas ĉirkaŭ 13,5 mil loĝantojn kaj estas trafike senprobleme atingebla.

Nian konferencon gastigos *Střední odborná škola lesnická a strojírenská Šternberk* (arbarista kaj maŝinista mezlernejo) je strato Olomoucká. Loĝigo estos en studenthejmo de tiu ĉi mezlernejo kaj samloke estas ankaŭ manĝejo. Pli detalajn informojn, speciale pri loĝado, sed ankaŭ pri programo vi ricevos en Starto n-ro 2 (en junio).

Estraro de ĈEA kore invitas vin partopreni, ĝui nian konferencon kaj eventuale ankaŭ aktive partopreni en la programo. Viajn proponojn por la programo vi povas sendi al

komitato@esperanto.cz.

# Zamenhof-verkaro

estas nun atingebla ĉe la viena muzeo https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/ludwik-l-zamenhof/

# NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO “ESPERANTO"

Ekde la aprila numero havos la revuo Esperanto novan redaktoron, pli precize redaktoro-paron. Unuafoje en la historio ĝi oficiale havos du redaktorojn, nome geedzan paron Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova. Laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA ambaŭ homoj laboras parttempe ĉe la prestiĝa Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj en Moskvo, kie ili studis ĵurnalismon (Dima) kaj literaturon (Anna) ĝis nivelo de magistriĝo. Dima estas denaska esperantisto kaj liaj diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto. Ambaŭ estas konataj kiel la gvidantoj de la grava eldonejo Impeto. Kune kun la preparado de sia unua numero (papera), ili planas krei „*modernan retejon de la revuo, kiu celos interagi kun la abonantoj kaj aŭtoroj“,* kiel ili proponis en sia kandidatiĝa letero.

# ĜENERALA VOĈDONO PRI ŜANĜOJ DE LA STATUTO

Inter la 16-a de septembro kaj la 15-a de decembro 2016 okazis Ĝenerala Voĉdono pri ŝanĝoj de Statuto de UEA. Per 7751 ĝis 8348 jesaj voĉoj el la 9 054 esprimitaj voĉoj, poŝte senditaj al la Centra Oficejo en Roterdamo, la membroj de UEA esprimis sian aprobon pri aro da ŝanĝoj proponitaj en ĝia Statuto (precipe memstariĝo de TEJO).

ĈEA kun pliaj 36 landaj kaj fakaj asocioj voĉdonis en ĉiuj punktoj jese.

*Libuše Hýblová*

*(laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA)*

## MAJA RENKONTIĜO
de la Katolika Sekcio
de ĈEA kaj de la Ĉeĥa
IKUE-Sekcio

## Svatá Hora u Příbrami 12.-14.5.2017

**Programo:** Konferenco, trarigardo da la pilgrimloko, sanktaj mesoj kaj rozariaj preĝoj
prelego de Max Kašparů, vespera projekciado k.a.



*foto:Jiří Jiroušek*

**Loĝado:** Spiritekzerca domo kun 1-3litaj ĉambroj kun lavujo kaj komunaj duŝejoj/necesejoj

**Prezoj:** Tranokto: por 1 nokto 280 CZK, por pli ol unu nokto 250 CZK/ nokto)
Manĝoj: matenmanĝo 45 CZK, tagmanĝo 90 CZK, vespermanĝo 65 CZK

Detala programo kaj aliĝilo haveblas en www.ikue.org/cz.

**Kontakto:**
Miloslav Šváček
Tršická ul. 6, 75127 Penčice
tel. (+420) 732 420 675
m.svacek@seznam.cz

## Asocio de esperantistoj – handikapuloj en Pardubice

elkore invitas vin al

## la 7-a internacia kongreso de AEH

kiu realiĝos en Rekrea centro Zámeček (Kasteleto) en Hodonín ĉe Kunštát en la tagoj de 21-a ĝis la 23-a de aprilo 2017 kun sekvanta lingva seminario ĝis 28-a de aprilo 2017.

La Rekrea centro Zámeček estas plene senbariera kun liftoj, sociaj salonoj kaj gimnastikejo. La tranoktado estas en 2-ĝis 4 litaj ĉambroj kun lavujo. Necesejoj kaj duŝoj estas en koridoroj.

**Temo de la kongreso:**
toleremo – limo de toleremo – interhomaj rilatoj

**De lundo 24.4. ĝis vendredo 28.4.2017** okazos lingvaj seminarioj. Antaŭtagmeze kurzoj, konversacio ktp., posttagmeze ekskursoj al Letovice, burgo Svojanov, Nové Město, Moravia Karsto ktp. laŭ intereso aŭ manlaboroj.

Adreso de la redakcio: Asocio de E-handikapuloj, Na Okrouhlíku 953/21,
CZ 530 03 Pardubice, Ĉeĥa respubliko
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu

**La prezo**:
tuta restado **125,- eŭroj / 3300 Kč**

Ĝojatendas Vin la komitato de AEH

Lenka Angelová, prezidantino
telefono por demandoj:
Angelová +420 775 323 903

**Výsledek hospodaření ČES za rok 2016, plán na rok 2017 a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

| **Příjmy** | rok 2016 | plán 2017 |
|---|---|---|
| Příspěvky na běžný rok | 17 937 | 19 500 |
| Příspěvky dobrovolné | 5 870 | 6 000 |
| Příspěvky na budoucí rok | 23 923 | 25 000 |
| Dary členů | 48 558 | 10 000 |
| Dary nečlenů | 39 263 | 5 000 |
| Dotace | 13 000 | 10 000 |
| Starto předplatné | 1 097 | 1 000 |
| Konference a sjezdy | 70 981 | 50 000 |
| Činnost klubů a sekcí bez PS | 0 | 2 000 |
| Muzeum | 0 | 0 |
| Libroservo | 2 967 | 4 000 |
| Kurzy esperanta | 2 800 | 4 000 |
| Příspěvky UEA ind. běžný rok | 6 330 | 5 000 |
| Příspěvky UEA ind. budoucí rok | 11 990 | 12 000 |
| Platby UK na běžný rok | 136 921 | 0 |
| Platby UK na budoucí rok | 0 | 40 000 |
| Platby ILEI a pedagog. komise | 300 | 900 |
| Úroky z účtů | 238 | 250 |
| Virtuální adresa | 0 | 200 |
| Zaměstnanci - příspěvek ÚP | 143 259 | 0 |
| Předkongres UK Svitavy | 128 727 | 0 |
| **Příjmy celkem** | **654 160** | **194 850** |

| **Výdaje** | rok 2016 | plán 2017 |
|---|---|---|
| Starto tisk | 19 995 | 20 000 |
| Starto distribuce | 15 822 | 16 000 |
| Konference a sjezdy | 82 627 | 45 000 |
| Činnost klubů a sekcí bez PS | 4 083 | 5 000 |
| Administrativa, kancel. pořeby | 6 802 | 2 500 |
| Jízdné funkcionáři | 300 | 5 000 |
| Přísp. na stravné za schůze | 650 | 700 |
| Muzeum | 21 602 | 20 000 |
| Libroservo nákup zboží | 1 409 | 4 000 |
| Libroservo poštovné a balné | 44 | 600 |
| Kurzy esperanta | 98 | 200 |
| Příspěvky UEA ind. běžný rok | 6 330 | 9 000 |
| Příspěvky UEA ind. budoucí rok | 8 192 | 12 000 |
| Platby UK v běžném roce | 136 921 | 0 |
| Platky UK na budoucí rok | 0 | 38 000 |
| Platby ILEI a pedagog. komise | 811 | 800 |
| Kolektivní členství v UEA | 720 | 1 000 |
| Kolektivní členství v EEU | 1 351 | 1 400 |
| Blahopřání, kondolence | 217 | 500 |
| Poplatky | 0 | 50 |
| Zaměstnanci | 144 745 | 0 |
| Daň z úroku | 45 | 50 |
| Nový majetek | 3 378 | 7 000 |
| Závazky k sam. klubům | 0 | 5 100 |
| Předkongres UK Svitavy | 97 769 | 0 |
| Ceniny | 17 250 | 0 |
| **Výdaje celkem** | **553 910** | **193 900** |

Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2016

| | |
|---|---|
| **peněžní prostředky** | |
| pokladna korunová | 600 |
| pokladna eurová | 0 |
| ceniny | 11 615 |
| účet Fio | 100 |
| účet Fio spořící | 429 539 |
| **peníze celkem** | **441 854** |
| *změna vůči 31.12.2015* | *16 950* |
| **investice** | |
| podílové listy | 190 009 |
| **investice celkem** | **190 009** |
| *změna vůči 31.12.2015* | *-476* |
| **pohledávky** | |
| UEA subkonto | 30 292 |
| UEA neuhrazená faktura | 281 |
| | |
| **pohledávky celkem** | **30 573** |
| *změna vůči 31.12.2015* | *-40 738* |
| **ostatní majetek ČES** | |
| drobný majetek v ceně pořízení | 160 230 |
| knihy v libroservu (odhad) | 25 588 |
| **ostatní majetek ČES celkem** | **185 818** |
| *změna vůči 31.12.2015* | *1 908* |
| **závazky** | |
| platby pro UEA | 4 840 |
| klub Brno | 5 095 |
| | |
| **závazky celkem** | **9 935** |
| *změna vůči 31.12.2015* | *-141 643* |
| **účelově vázané prostředky** | |
| fond Tilio | 27 392 |
| fond ediční | 12 660 |
| fond Cigno | 29 197 |
| sekce nevidomých | 21 429 |
| klub Mladá Boleslav | 16 121 |
| klub Karlovy Vary | 7 697 |
| klub Havířov | 2 462 |
| ost. kluby a sekce bez pr. os. | 23 637 |
| **celkem** | **140 595** |
| *změna vůči 31.12.2015* | -9 688 |

Pozn:

- byly pořízeny 2 externí pevné disky pro zálohování dat

Majetek ČES se reálně zvýšil o téměř 118 tisíc Kč.

Rozhodující přínosy měl předkongres UK, dary členů a dary nečlenů a dotace, provize za platby ind. čl. UEA a poplatek UK.

Ni invitas vin elkore al

INAŬGURO DE LA NOVA EKSPOZICIO

# „Homo kontraŭ Babelo“

sabate la 10an de junio 2017 ekde 10:30
en Esperanto-Muzeo en Svitavy

ĈEA



Ĉi-foje atendos vin tute nova ekspozicio. Unua parto estos dediĉita je rememoro pri tri jubileantoj - ne nur L. L. Zamenhof (1859-1917), sed ankaŭ František Vladimír Lorenc (1872-1957), unika poligloto, kiu proprakoste kiel 18-jara studento eldonis en 1890 la unuan Esperanto-lernolibron por ĉeĥoj, kaj Theodor Čejka (1878-1957), nestoro de Esperanto-Movado sur teritorio de Ĉeĥio. Dua parto estos dediĉita al niaj gastoj el tuta mondo. Ni pretigas por vi ankaŭ komplete novan multmedian enhavon de la infopanelo kaj virtualajn kolektojn en la komputilo por vizitantoj.
Ni esperas, ke ĉiu el la gastoj trovos por si ion interesan.

**Supozata programo:**

10:30 - 12:15 Inaŭguro de la ekspozicio kun akompana kultura programo, zamenhofa tosto kaj eta refreŝiĝo
12:30 - 14:30 Tagmanĝo kaj libera tempo en la urbo
14:30 - Prelego de Petr Chrdle pri F. V. Lorenc „Forgesita genio“ kaj bapto de la nova libro „František Vladimír Lorenc“
16:00 - Prelego de Ján Vajs „12-a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo"
19:00 - Koncerto de la muzikgrupo NO PROBLEM (kantanta ankaŭ Esperante)

Partopreno en la tuta programo estas SENPAGA!
Interesatoj povos komune manĝi en la restoracio ASTRA.

Vendredon la 9-an de junio 2017 vi povos partopreni en aranĝo **„Muzea nokto“**, pri kiu vi pli povas legi je sekvonta paĝo kaj dimanĉe la 11-an de junio ni proponas precipe (sed ne nur) por eksterlandaj gastoj ekskursi al la urbo Litomyšl (kaj tiea renesanca kastelo sur UNESCO-listo) aŭ la urbo Polička (per publika buso). Tiel vi havos eblecon pasigi tri tagojn per abunda programo kun viaj esperantaj geamikoj.

Proponatas tranoktebleco por 1 aŭ pliaj noktoj en FATIMA Koclířov, iama klostro, situanta 6 km for de la muzeo en 2-3-litaj ĉambroj kun propra duŝejo/necesejo (aŭ komuna por du ĉambroj) (290,- CZK/nokto kaj persono) aŭ en 2-4-lita ĉambro kun duŝejo/necesejo komuna surkoridore (190,- CZK/nokto kaj persono). Ni prizorgos por vi aŭtomobilan transporton al FATIMA kaj reen kontraŭ unufoja krompago 50,- CZK. Interesiĝantoj pri tranokto bv. skribi laŭeble plej frue al libuse.dvorakova@esperanto.cz (nombro de lokoj estas limigita).,

Trajnoj el direktoj Česká Třebová kaj Brno venas sabate ĉ. la 10-a horo kaj forveturas ĉ. la 18a horo. Venu por ekkoni ion novan, renkonti viajn geamikojn kaj tosti kune la zamenhofan jubileon! Ni ĝojatendas vin!

Ĝojatendas vin komitato de ĈEA kun sia Muzea kaj ekspozicia grupo kaj anoj de E-klubo Svitavy.

# MUZEA NOKTO

Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy invitas vin kore la 9an de junio 2017 al la aranĝo „Muzea nokto“, kiu okazos en Esperanto-muzeo kaj en Urba muzeo kaj galerio en Svitavy. Tiu ĉi aranĝo havas en la urbo jam longan tradicion, en kiu partoprenas ankaŭ nia Esperanto-muzeo. Ni konatiĝos vin kun la programo en la E-Muzeo kaj en Ottendorfer-domo, sed riĉa programo estos ankaŭ en proksima Urba muzeo, kie vi ekzemple povos je 17a horo partopreni en inaŭguro de nova ekspozicio.

Programon en la Esperanto-muzeo preparas por vi anoj de la Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy kaj teatra trupo DOMA sub reĝisorado de Blanka Oblouková. Tiun tagon vi havas unuuran eblecon reveni en la tempon de malfermo de Ottendorfer-domo, do en la komencon de 20a jarcento.

Partopreno estas senpaga, kaj ĉar la programo estas preparata por vasta publiko, ne nur por esperantistoj, tuta aranĝo okazos en ĉeĥa lingvo.





**Supozata programo:**

15:30 - prelego de Petr Chrdle pri „F. V. Lorenc - forgesita genio“ kaj prezentado de nova libro pri F. V. Lorenc

16:30 - inaŭguro de nova ekspozicio „Homo kontraŭ Babelo“

17:00 – prelego de Ján Vajs pri la „12a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo“

20:00 - kultura programo en Muzeo de Esperanto kaj en salono de Ottendorfer-domo preparata de anoj de teatra trupo DOMA kaj anoj de Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy

Tiuj, kiuj volas resti ĝis sabato aŭ eĉ dimanĉo, rigardu al la tranokteblecoj sur antaŭa paĝo. Por pliaj informoj kaj por mendi loĝadon skribu al dvor.libuse@seznam.cz.

# Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy

elkore invitas vin al

**internacia renkontiĝo en Svitavy**
**en la tagoj de 22-a ĝis 28-a de septembro 2017**

**Programo:** prelegoj, projekciado, amuzaj vesperoj, ekskursoj al urbo Chrudim, Ležáky, Veselý Kopec, Vojtěchov, Polička, Praha, burgo Svojanov
Promeno ĉirkaŭ la urbo Svitavy

**Loĝado:** en pensiono Bárta kun 1-3 litaj ĉambroj (kun propraj duŝoj kaj necesejoj) aŭ en hotelo Garni aŭ Slavie

**Prezoj:** tranokto: por 1 nokto 350,- CZK en pensiono,
Dulita ĉambro 1513,-CZK en hotelo Garni kun matenmanĝo
Tagmanĝo kaj vespermanĝo en restoracio Astra laŭ via elekto
(ĉirkaŭ 80-110,-CZK)

**Partoprenkotizo:** 500,– CZK (tiu ĉi pago kovros la kostojn de busoj dum ekskursoj).

**Detala programo** en www.esperanto.cz

**Aliĝilo:** eklubosy@seznam.cz

**Kontakto:** Libuše Dvořáková,
Zahradní 2/b, 568 02 Svitavy
Tel. +420 604 377 616
dvor.libuse@seznam.cz



# LEGAĴO 2

estas jam havebla kontraŭ 50 Kč ĉe Jindriška Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav, drahotovaesperanto@seznam.cz.

# Lančov 2017



1-a etapo ne okazos
2-a etapo 16.7.2017 - 29.7.2017
3-a etapo 30.7.2017 – 11.8.2017
**Renkontiĝo de ekstendaranoj:**
11.8.2017 – 13.8.2017
let.lancov@seznam.cz
tel. 604 940 663
www.set-lancov.cz

# INTER-FEST

6. - 12. aŭgusto 2017
Bjelovar, Kroatio

La Internacia Festivalo havos kiel ĉefan temon: *Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo*.
www.esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html
esperanto.bjelovar@gmail.com

# Letero de Zamenhof

kiun Majstro skribis al Emanuel Kubásek (23.4.1914) estis trovita en la kluba kroniko de Ostrava -Vítkovice.

# Projekto EAEY

celas plifortigi afrikan junularan Esperanto-movadon, kvankam la nomo de la projekto estas anglalingva (**Empower African and European Youth!**) Al la projekto jam aliĝis junularoj eŭropaj (pola, slovaka) kaj afrikaj (burunda, togolanda, benina, konga) por proksimigi komunumojn el foraj landoj.

Kunordiganto Pierre Vittet
pierre-vittet@pvittet.com
http://eo.pvittet.com

# Deziras korespondi

Mi estas 48-jara lingvisto, poeto kaj esperantisto ekde januaro 2016. Mi volas ŝanĝi amikajn, kulturajn kaj intelektajn ideojn kun vi! Mark Hamme, 33391-379, U.S.P. Tuscon, P.O. Box 24550, Tuscon, AZ 85134, USA.

# Pri Karlŝtejn

verkis interesan artikolon pola esperantisto Adam Wilkius post sia vizito de la kastelo. Interesiĝatoj trovos ĝin en la retejo: http://esperantobrno.cz/malnova/wilkus-adam_karlstejn.pdf

# Filmeto Patrino

el Ĉeĥio en la 2-a filmfestivalo de Ĉina Radio konkursas kun aliaj filmetoj pri premio, vi povas baloti, kiu filmo al vi plaĉas:
http://esperanto.cri.cn/html5/index_culture.htm

# Duolingo

Al la reta kurso por anglalingvanoj aliĝis jam 780 000 homoj kaj al la kurso por la hispanlingvanoj 74 000 personoj.

# Esperanto en amaskomunikiloj

La semajna radia gazeto **Rozhlas** aŭtune publikigis artikolon de Věra Nosková *Spřízněni umělým jazykem* (Amikigitaj per artefarita lingvo) kaj de Robert Škarda *Rusalka v esperantu nebo opereta se Schubertem* (Najado en Esperanto aŭ opereto kun Schubert).


En **Moravskoslezský deník** 18.1.2017 aperis artikolo de Boleslav Navrátil *Esperanto a historie pomníku v Rottově sadu* (Esperanto kaj historio de monumento en Rott-parko) en Bohumín.

La 1-an de februaro 2017 gastis RNDr. Pavel Lehký en radio-elsendo **VPV** (Vysíláme pro Vás – Ni elsendas por vi) pri la problemoj de komunikado en Eŭropo. En alia elsendo estas aŭdebla kontribuo de Věra Ludíková *Věk nadějí* (Epoko de esperoj).

Gazeto **Knižní novinky** (Libraj novaĵoj, 13.2.2017) intervjuis Petr Chrdle pri lia eldonejo KAVA-PECH.

Gazeto **Písecké postřehy** (Observoj el Písek) en marto 2017 intervjuis esperantistinon el Bavorov Jaroslava Malá sub redakto de Pavla Maradová.

En la televida kvizo **Kde domov můj** (Kie mia hejmo – titolo de la ĉeĥa himno) la 2-an de marto 2017 la ludgvidanto Aleš Háma metis demandon pri Esperanto-muzeo en Svitavy.




Nova slovaklingva libro de **Max Kašparů** *Nebudem hrať divadlo pred Božou tvárou* (Mi ne ludos teatron antaŭ la vizaĝo de Dio) esprimas ankaŭ lian rilaton al Esperanto.

# Esperanto en 12 tagoj

nova reta kurso laŭ Zagreba metodo troveblas ĉi tie www.sskola.cz/esperanto-za-12-dni/

# StudentMag

En la retejo por studentoj aperis ankaŭ artikolo pri Esperanto https://studentmag.topzine.cz/jak-se-naucit-esperanto-zaradte-se-mezi-2-miliony-jeho-uzivatelu/

# Afrika Kongreso de UEA



okazis jarfine 2016 en Tanzanio, jam la 6-a, kun okdek partoprenantoj el 8 landoj afrikaj kaj 6 eksterkontinentaj. Ĉirkaŭ 20 studentoj devis retiriĝi pro vojaĝaj obstakloj.

# Jaro de la lernanto

estas iniciato de ILEI, kiu volas per trejnado AMO (Aktivula Maturiĝo) kaj aliaj aranĝoj akceli instruadon de Esperanto en diversaj mondopartoj.

La gazeto Internacia Pedagogia Revuo fine de 2016 iom malfruis kulpe de distribua firmao. La revuo havas novan retejon www.ilei.info/ipr/index.html kun arkivo de malnovaj numeroj ekde 2005 kaj aliaj pedagogiaj materialoj.

Vizitindas ankaŭ retejoj Edukado.net (www.edukado.net/) kaj nova kurso ĉe Lernu (https://lernu.net/cs).

# FALSAJ AMIKOJ

Certe vi ĉiuj konas vortojn, kiuj similas en la ĉeĥa kaj en esperanto, sed ilia signifo estas tute alia. Ni nomas ilin „falsaj amikoj“ kaj jen vi povas trovi kelkajn, kiujn ni por vi elektis.

| | | | |
|---|---|---|---|
| **apríl** | aprila ŝerco | **aprilo** | duben |
| **banket** | bankedo | **banketo** | malá banka |
| **bar** | drinkejo | **baro** | překážka |
| **bol** | malĝojego, aflikt(iĝ)o | **bolo** | var, vření |
| **bota** | ŝuo | **boto** | vysoká bota, kozačka |
| **cela** | ĉelo | **celo** | cíl |
| **cep** | draŝilo | **cepo** | cibule |
| **čas** | tempo | **ĉaso** | lov |
| **datum** | dato | **datumo** | údaj, j.č. od data |
| **deka** | kovrilo | **deko** | desítka |
| **dezert** | deserto | **dezerto** | poušť |
| **doma** | hejme | **doma** | domovní |
| **dub** | kverko | **dubo** | pochybnost |
| **džem** | konfitaĵo | **ĝemo** | povzdech |
| **eben** | ebono | **ebeno** | rovina |
| **fakulta** | fakultato | **fakulto** | (duševní) schopnost |
| **firma** | firmao | **firma** | pevný |
| **jako** | kiel | **jako** | sako, krátký kabát |
| **kamera** | kamerao | **kamero** | komora |
| **kapr** | karpo | **kapro** | kozel |
| **kaše** | kaĉo | **kaŝe** | tajně, skrytě |
| **lupa** | lupeo | **lupo** | vlk |
| **máma** | panjo, patrino | **mamo** | prs, ňadro |
| **maso** | viando | **maso** | masa, hmota, spousta, hromada |
| **med** | mielo | **medo** | medovina |
| **mor** | pesto | **moro** | mrav, způsoby |
| **pan** | sinjoro | **pano** | chléb |
| **planeta** | planedo | **planeto** | malý plán |
| **plot** | barilo | **ploto** | plotice |
| **pól** | poluso | **polo** | Polák |
| **pot** | ŝvito | **poto** | hrnec |
| **provize** | provizio, procentaĵo, kurtaĝo | **provizo** | zásoba (zboží) |
| **rada** | konsilo | **rado** | kolo (vozu) |
| **rána** | vundo | **rano** | žába |
| **sako** | jako | **sako** | vak, pytek |
| **sál** | salono | **salo** | sůl |
| **sama** | sola, mem | **sama** | stejný |
| **skot** | brutaro | **skoto** | Skot |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **sorta** | speco | **sorto** | osud |
| **stát** | ŝtato | **stato** | stav |
| **syn** | filo | **sino** | klín, lůno |
| **tým** | teamo | **timo** | strach, obava |
| **vana** | bankuvo | **vana** | marný |
| **verš** | verso | **verŝo** | lití, zalévání |
| **veto** | vetoo | **veto** | sázka |
| **vina** | kulpo | **vino** | víno |
| **vir** | viruso | **viro** | muž |
| **whisky** | viskio | **visko** | jmelí |
| **zima** | vintro | **zimo** | kvasnice, droždí |

*Libuše Hýblová*

# Silvestro 2016 en Česká Třebová






# Tosto por Zamĉjo en Litovel

La 18-an de februaro mi partoprenis renkontiĝon kun la nomo Tosto por Zamĉjo en Litovel. Temas pri serio da aranĝoj organizata de praga grupo de esperantistoj E-mental´ okaze de 100-a mortodatreveno de L. L. Zamenhof. En Litovel partoprenis ne nur geesperantistoj, sed ankaŭ niaj neesperantaj geamikoj el grupo de turistoj el Šumperk. Ni renkontiĝis sur la urba placo, kie ni konatigis niajn geamikojn kun Esperanto kaj ili poste partoprenis en nia tuta programo. Unue ni tostis je Zamenhof laŭ la nomo de la aranĝo kaj poste ni baptis la plej grandan E-flagon en la Ĉeĥa respubliko, kiun anoj de E-mental´ kudris kun hungaraj geamikoj speciale por tiu ĉi aranĝo. Post promeno ĉirkaŭ la urbo kun esperanto-flagoj, ni grimpis sur la turon de la urbodomo, kie ni pendigis por certa tempo la plej grandan flagon. Tion iomete komplikis vento, tamen ni sukcesis!



Poste ni tagmanĝis en proksima restoracio, kie okazis ankaŭ distra programo, nome kvizo pri vivo de L. L. Zamenhof. Mi volonte subtenis tiun ĉi aranĝon per mia partopreno kaj rekomendas al vi ankaŭ partopreni en tiu aranĝo. Kiam kaj kie okazos la aranĝo venontfoje vi povas legi je www.esperanto.cz kaj je www.e-mental.cz. Venontaj plej proksimaj „Tosto por Zamĉjo“ okazos 26. 3. en Beroun kaj 8. 4. en Lipník nad Bečvou.

Se vi organizas iun aranĝon okaze de Zamenhofjaro, informu nin, ni volonte informos pri via aranĝo en la retpaĝaro de ĈEA kaj laŭeble partoprenos.

*Libuše Hýblová*
*foto Vít Mišurec*

# EK Šumperk invitas vin

Permesu al mi inviti vin nome de nia klubo al tradicia maja renkontiĝo, kiu okazos ĉi-jare la **20-an de majo** en Šumperk.

Ĉi jare pasos kvindek jaroj ekde la tago, kiam estis plantita nia E-arbo en Velké Losiny, sed pro certaj kaŭzoj ni ne povas renkonti tie.

Do ni renkontiĝos je la 9.45 hod ĉe la trajnstacidomo en Šumperk, vizitos privatan Historian muzeon de armeo kun kolektaĵoj el 1-a kaj 2-a mondmilitoj.

Poste ni promenos iom en la urbo, tagmanĝos en restoracioj (ni proponas du por elekti) kaj poste estos programo en vintrinkejo „U Jitky“.

Pliajn detalojn ni aperigos je retpaĝaroj de ĈEA kaj de nia klubo kaj se vi bezonos, telefonu je 774 928 974.

Nome de EK Šumperk

*Kvido Janík*

# Tajlanda kursaro



Komence de la nuna jaro mi vizitis Tajlandon kaj kiam mi kontaktis lokan esperantiston, mi ekscis, ke ĝuste en la tagoj de mia alflugo, okazos semajnfina kursaro. Mi kompreneble volonte partoprenis kiel gasto.



Lerni Esperanton alveturis homoj el jenaj landoj: Tajlando – 7, Japanio – 5, Vjetnamio – 3, Hungario – 2, Francio kaj Germanio po 1. Komencantojn instruis Mark Starrs, aŭstralano longe vivanta en Tajlando, mezan grupon gvidis hungaro d-ro Márkus Gábor, prezidanto de Eŭroazia Kultura Centro, kaj konversacian estris s-ro Usui Hiroyuki, japano laboranta en El Popola Ĉinio.

Por mi estis interesa, ke komencantoj lernis el lernolibro de Stano Marček, kiun en tajan lingvon tradukis Mikuláš Nevan helpe de sia taja edzino. Sur unua foto estas grupo de komencantoj kun Mark Starrs (staranta) kaj dua montras parton de meza grupo gvidata de Márkus Gábor. Kiel gasto venis ankaŭ ĉiliano vivanta nun en Tajlando.

*Teksto kaj fotoj Pavel Polnický*

# Jubileoj

Ni elkore gratulas al niaj membroj, kiuj festis sian jubileon en januaro ĝis marto 2017:



Jitka Babincová, Turnov
Ladislav Brejcha, Liberec
Zdeněk Dvořák, České Budějovice
Jiří Hudera, Světlá n.Sáz.
Jaroslav Jarolím, Krmelín
Marie Kamenovská, Ratíškovice
Mária Kašparů, Rynárec
Josef Kavka, Praha
Martin Křížek, Nová Paka
Mojmír Mackovík, Přerov
Josef Mendl, Milevsko
Eva Pazourková, Pardubice
Stanislav Pech, Blovice
Bohuslava Pelclová,
Jiří Pelech, Mladá Boleslav
Blanka Podvolecká, Hranice
Jan Příborský, Olomouc
Mária Stibůrková, Benešov
Ivanka Sečkařová, Třinec

## La 15a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken

### 27.12. 2016 - 3.1. 2017

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en Saarbrücken por kune festi la Novjaran Renkontiĝon en gaja kaj amika etoso. La evento estas organizata de la asocio EsperantoLand. La ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven kun pluraj helpantoj pretigis interesan jarfinan semajnon. Pri la programo zorgis Betti Maul, pri la tekniko okupiĝis Pjotr de Mulder kaj Klaus Rumrich. Al la programo multe kontribuis ankaŭ Ines kaj Christoph Frank. La NR-on partoprenis 196 ge-esperantistoj el 15 landoj ne nur el Eŭropo. Ĉeestis multaj familioj kun infanoj kaj gejunuloj ĝis 19 jaraĝaj.



Riĉa programo kontentigis ĉiujn ĉe-estantojn. Ni povis ĝui diversajn prele-gojn, diskutrondojn, laborgrupojn, ateli-erojn, kvizojn, diversnivelajn Esperanto-lingvokursojn. Oni povis lerni ankaŭ la hispanan. Ne mankis riĉa libroservo, variaj tabloludoj, vesperaj filmoj, malstreĉiga gimnastiko aŭ ritme vigla zumbo, kurso de tango kaj ĉendancado. Intereson vekis plibonigo de memoro per la japana lingvo, budaisma plenkonscia meditado, balada kulturo de Feroaj insuloj, la libroarto-Orimoto kaj aliaj programeroj.

Ni eksciis kiu inventis la komputilon kaj kial la homoj neas sciencon, kien iros Eŭropo post la breksiĝo, pri la dana filozofo Martinus, pri liberalaj religioj, pri Duolingo, pri la Edena ĝardeno, pri justa komerco, pri gravitaj ondoj, pri Esperanto en Afriko, pri perspektivoj de Eŭropa Unio kaj eĉ pri bano, duŝo kaj necesejoj tra la mondo. Interesis nin matematika prelego pri senfineco, ĝiaj problemoj kaj paradoksoj, la historio de Kubo kaj Usono, la vivo sur strangaj mondoj kaj la vivo sur la orient-frisaj insuloj.

Ni diskutis pri monda politiko, pri enmigrantoj, pri disvastigo de Esperanto, pri ReVo (Reta Vortaro). La projekton "Unu leciono pri Esperanto, por ĉiuj lernejanoj" proponis Lu Wunsch-Rolshoven. Pri la demando "Ĉu normalaj infanoj ankoraŭ ekzistas?", prelegis kaj diskutis Martin Markarian. Pri "Ĉu reguligita laŭleĝigo de kanabo estas dezirinda?" raportis kaj diskutis Markos Kramer. Gijom' Armid organizis seminarion pri "Vivi por feliĉi aŭ feliĉi por vivi?"

Okazis tradukateliero kun Brian Moon kaj István Ertl, konstruo de sorobano kun Kimie Markarian, Risko-kvizo kun Edy Van den Bosch, scienca kvizo por teamoj kun eksperimentoj kun Klaus Rumrich, skeĉoj de Mirejo Grosjean okaze de la jaro de lernado.

Ni spektis bildprezentojn de Amri Wandel pri Slovakio, Slovenio, Monte-negro kaj pri *Petra*, la antikva mistera ĉefurbo en la jordana dezerto. Bernard-Regis Larue gvidis nin tra parkoj de *Yel-lowstone* kaj *Colorado* en Usono. Ulrich Brandenburg rakontis kaj montris intere-

sajn bildojn pri Portugalio, kie en la jaro 2018 en Lisbono okazos la 103-a Universala Kongreso. Li donis al ni emon partopreni ĝin.

Ankaŭ la infanoj ĝuis tre riĉajn programerojn en multaj atelieroj. Interesis ilin pretigado de pilkoj por ĵonglado, origamio, fabrikado de strigoj kaj aŭtoj el kartono, pupetoj el ŝtofoj. Ne mankis rostado de bananoj kun ĉokolado, preparado de filmeto farita el fotoj, poŝtranĉiloj, kantado, ĵonglado, feltumado kaj ornamo de kandelingoj. La plej malgrandaj kun entuziasmo sekvis Mazi-kurson. Plaĉis al ili ludado kun samaĝuloj kaj libera petolado. Dum la paŭzoj virinoj trikis, iuj komputilis, legis, kartludis aŭ babilis ĉe glaso da vino, biero aŭ kafo.

Estis prezentitaj fotoj el la pasintjara NoRo, beletra Almanako. Vespere ni ĝuis pup-teatraĵon: "Avino! kriĉas Filipo" fare de Christoph Frank, koncerton de ĴeLe kun akompano de la kubano Geomar. Plezure koncertis ankaŭ Gijom' kaj Kim. Dum la Internacia vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis pian-, kontrabas-, violon-, kaj flut-ludadojn, ĵongladon, ĥor-kantadon, dancadon, kanĵi-kvizon kaj skeĉojn de István Ertl. Ĉe la fino Lu Wunsch-Rolshoven dankis al ĉiuj kontribuintoj kaj al la partoprenintoj de la aranĝo.

Gaje ni bonvenigis la Novan jaron per tostoj, kisoj kaj bondeziroj de ĉio bona por la jaro 2017, esperante denove renkontiĝi jarfine en NR.

*Liba Gabalda*



*Oleksandr Oles*

# MEMORU

Dum Ukrainio en morta batal'
La rajton de l' viv' kontraŭ bestoj defendis,
Nur volis kompaton pro sia fatal',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio, lasita de Di',
La tuta plu sangis kaj plore lamentis,
Atendis ĝi helpon amikan por si,
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio en jugo el fer'
Servutis kaj plugis, ĝin vundoj turmentis,
Eĉ rokoj sin movis pro tiu sufer',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio en sangrikoltad'
Por la torturant' sian morton jam sentis,
Eĉ vortoj mutiĝis pro nigra malsat',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio la vivon sen bon'
Malbenis kaj tombon prezentis,
Eklarmis eĉ fia malica demon',
Eŭropo silentis.

*22.08.1931*

*Elukrainigis Petro Palivoda*

# Věra Ludíková: PF 2017

Procházíš předsálím se snítkou tajemství,
se jmelím, zlatou ratolestí,
zdobíš jím příbytky, krátíš si adventní čas,
když čekáš na zázrak božího zrození –
až přítmí se promění v úplný jas…

# Věra Ludíková: PF 2017

Pasante portikon kun frondo de mistero,
kun viska ora branĉero,
vi ornamas loĝejojn per ties fasko,
konscias la tempon de advento,
kaj atendas la miraklon de l´Kristnasko –
la ŝanĝon de l´nokto al brila evento.

*Trad. J.W. 2017-01-03*

# Esperanto-kulturaj libroj
## plano pri verko kaj eldono

Memore al la 100-datreveno de Zamenhof-morto en 2017 kaj reage al alvoko de UNESCO pri tio en 2015, post sesmonataj streĉaj preparo kaj komunikado jam ekas la plano pri verko kaj eldono de „Serio da Esperanto-kulturaj libroj”.

Antaŭ aprilo 2018 ni plenumos verkadon kaj eldonadon de kvin libroj kiel eble plej kapable. Jen la kvin libroj:

1. Historio pri Zamenhof-familio (ĉina lingvo);
2. Albumo pri Zamenhof (ĉina lingvo kaj Esperanto)
3. Tuta Vivo de Zamenhof (ĉina lingvo)
4. Naturaj Lingvoj kaj Artefaritaj Lingvoj (ĉina lingvo)
5. Historio pri la Esperanto-Movado en Liaoning (ĉina lingvo kaj parte en Esperanto)

Estimataj, ni kore dankos vin kaj mencios vin en la priaj libroj, se vi senpage ofertas la valorajn materialojn aŭ informojn, ni kunlabore verkos se vi volas partopreni en la kompila komitato. Sendu al ni biografieton pri vi, kun naskiĝtago, sekso, profesio, adreso kaj retadreso, kiam vi pretas kontakti nin.

*Ĉefredaktoro: s-ro Song Yunsheng*

*S-ro Song Yunsheng (1943), povoscianta kvar eksterlandajn lingvojn (angla, rusa, japana, Esperanto), estis la unua premiito de Traduka Instituto kaj Monda Kultura Interŝanĝa Komitato de Liaoning-provinca Verkista Asocio.*

Retadreso:
ghemelurboj@sina.cn amikeco999@21cn.com

# Ministro dankis al Povilas Jegorovas

La 28an de septembro 2016 prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas pro sia esperantista agado estis honorita per speciala Dankfolio de la ministro pri eksterlandaj aferoj de Litovia Respubliko Linas Linkevičius.

La ministro skribis:

*Mi sincere dankas pro la multjara kaj konsekvenca laboro en popularigo de Esperanto en Litovio kaj ekster ĝiaj limoj. Per sia sencohava agado Vi kontribuas al diskonigo de Litovio kaj kreas pozitivan imagon pri nia ŝtato. Mi deziras al Vi neelĉerpeblan krean energion kaj novajn iniciatojn!*

Ĝi estas unu el multaj honoroj, kiujn Povilas Jegorovas ricevis pro sia esperantista agado de diversaj Litoviaj ŝtataj instancoj.

*Laŭ la Ondo de Esperanto*

# Vinilkosmaj novaĵoj

La tri muzikaj produktoj de la jaro (**jOmO Okcitanas, Bosniumas** de la bando Espo Despo kaj **Sovaĝa animo** de la tre dinamisma bando el Brazilo, BaRok-Projekto) povis esti eldonitaj dank' al la abonoj de la ABONKLUBO - tiuj abonoj estas gravegaj kaj decidigaj kaj ni invitas vin reaboni:

http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html

Nia kompleta katalogo ĉe
http://www.vinilkosmo.com

# Marcipana Kristnasko 2016



Ankaŭ la 9-a marcipana Kristnasko sukcesis ĉe la publiko de Svitavy kaj ĉe esperantistoj. La regulaj gastoj venas jam antaŭ la 9-a horo, ekzemple la sepjara Samuel Švub jam post la 8-a horo salutis de la muzea pordo „Bonan tagon“. Nia esperantista etulo ne mankas ankaŭ ĉe aliaj aranĝoj, inkluzive de konferencoj kaj kongresoj. Dezirindas pluaj tiaj samideanetoj. Kun panjo Andrea li modlas sub gvidado de Anjo Vyšinková marcipanajn figuretojn, kies sortimento ĉiujare ŝanĝiĝas.



Alveturis ankaŭ familio de Petr Diblík el Srch apud Pardubice.

Plie nin plezurigis vizito de la gefratoj Annelies kaj Rainer Rudolf el Germanio. Ili venis unu tagon pli frue por ĝui ne nur la marcipanan Krisnaskon, sed ankaŭ la Kristnaskan foiron sur la placo.



Annelies mem provis modladon kune kun infanoj. Ŝi ne estis escepto, ĉar ankaŭ plenkreskuloj venas modli.



Ĉi-foje la klubo ne aljuĝis memor-diplomojn, ĉar kelkaj el la organizantoj devis forveturi al Litomyšl, por parto-preni bapton de nova libro de Stanislav Bubeníček.

Ĝis la 16-a horo la infanoj kreis 286 figuretojn kaj jam nun demandas pri la venonta marcipano.

*Libuše Dvořáková*

# Bapto de nova libro de Stanislav Bubeníček

Dimanĉe la 4-an de decembro 2016 okazis bapto de nova libro de D-ro Stanislav Bubeníček (1904-1979) *Povídej, dědo, jaks byls malejs* (Rakontu, avĉjo, pri kiam vi estis etulo). Stanislav Bubeníček, por esperantistoj Stan Bubenič, estas unu el la tri verkistoj, kiuj vivis en Litomyšl kaj verkis esperantlingve. Stanislav Bubeníček estis advokato, verkisto, amatora fotografisto kaj filmisto, muzikisto kaj humuristo naskiĝinta en Litomyšl.



La redaktinto d-ro Martin Boštík

La praktikadon de advokateco li devis forlasi (same kiel lia edzino Valerie) en la 1950-aj jaroj kaj transiri al laboristaj profesioj. Tiamaniere li venis kiel klarnetisto al cirkoj Čechie kaj Humberto. Li estis pasia leganto kaj ankaŭ verkis. Komence bonhumorajn rakontojn pri tribunalaj kazoj kaj en 1965 aperis lia romano pri la cirka medio *Kvapík pro lipicány* (Galopo por lipicaj ĉevaloj).

Al Esperanto li komencis dediĉi sin nur post emeritiĝo kaj reveno al Litomyšl, kie li fariĝis membro de la loka Esperanto-klubo kaj konatiĝis kun Karel Píč, fama esperantista verkisto. En adresaro de esperantistoj trovis s-ron Bubeníček s-ino Jenny Heetkamp-Senstius el Hago, ili komencis korespondi kaj Jenny eĉ plurfoje lin vizitis. Kiam li konfesis, ke li eldonis romanon, ŝi petis lin esperantigi ĝin. D-ro Bubeníček plenumis ŝian peton, la romanon li mem tradukis kun nova nomo „Sub cirkotendo“ kaj danke al Jenny ĝi aperis en 1988 en Haago (preskaŭ dek jarojn post la morto de la aŭtoro).

La filino de Stanislav Bubeníček, s-ino Marie Hofmanová trovis manuskripton de rakontoj, kiujn ŝia patro verkadis por siaj genepoj. Preparon kaj kolektadon de materialo akceptis laborulo de la Regiona Muzeo en Litomyšl Martin Boštík. Krom la rakontoj mem troviĝas en la libro multaj interesaj informoj pri la vigla denaskulo. S-ro Boštík komencis esplori pri la pasinteco de la verkisto ankaŭ inter esperantistoj. En la libro li dankas ilin. Li dezirus same kiel s-ino Hofmanová, se ankaŭ tiu ĉi libro estus esperantigita kaj estus lanĉita al esperantista publiko. Unu ekzemplero estis donacita ankaŭ al Esperanto-muzeo en Svitavy.

Libuše Dvořáková



Ĉeestantaj esperantistoj

# Kluba vivo

**Prostějov**: La klubo festos ĉi-jare sian 110-jariĝon. La 29-an de decembro 2016 en la klubejo okazis Silvestra renkontiĝo kaj la 2-an de februaro 2017 samloke la jarkunveno elektis jenan komitaton:




Jaroslav Liška (prezidanto), Milan Smělý (bibliotekisto), Jiří Kincl (kasisto), Jitka Hanáková (kontrolistino de budĝetoj), Božena Danišová (komitatanino).

**Olomouc**: La 10-an de decembro 2016 kunvenis 13 homoj por antaŭkristnaska renkonto en Tyflocentro. Kantis kaj muzikis geedzoj Jelínek, s-ino Karašová kaj s-ro Duda.






**Pohořelice:** Dum Kristnasko 2016 eksonis ankaŭ esperanta kanto
www.youtube.com/watch?v=EoWkpVF7gnA



## E-mental en Litovel:



**Brno**: En la klubejo okazas regule ĉiu-merkrede prelegoj pri diversaj temoj.





Ekzemple pri komputilo Frambo (maldekstre), pri la naturo k.s. Multaj estas elŝuteblaj:
http://esperantobrno.cz/malnova/elsutu.html

**Písek**: Kadre de la tradicia AnkRo (Antaŭkristnaska renkontiĝo), kiun krom sudbohemianoj partoprenis ankaŭ gastoj el EK Prago, Pilseno kaj Pelhřimov, okazis en la Urba Biblioteko jam la 8-a Adventa Matineo, destinita ankaŭ por la loka publiko.



Denove parton de la programo ĉeestis redaktoroj de du distriktaj ĵurnaloj, kiuj sekve informis pri la aranĝo. Allogaĵoj de la programo por neesperantistoj estis surscenigo de la nekonata kristnaska komponaĵo de la komponisto aginta en Písek F. Gregora (1819-1887) kaj prezento de la nova kalendaro de la loka aprezata aŭtoro de meditaj pentraĵoj Václav Švejcar (1962-2008), kiu estis simpatianto de la ideo de Esperanto kaj pri kiu venis paroli mem lia edzino. Por la matineo estis denove preparita eta ekspozicio de Esperanta literaturo kaj ĉi-foje ankaŭ de historiaj bildkartoj kaj korespondaĵoj el 1910. La klubo donacis al kolekto de la biblioteko denove plurajn librojn.



Dum la posttagmeza programo krom la tradicia kristnaska parto estis ankaŭ prezentite, kiel ciferecigo de malnovaj gazetoj kaj interreto ĝenerale helpas al detektiva esplorado pri naskiĝo de Esperanto-movado en Suda Bohemio. Pri la rezulto vi esperéble legos en iu sekva numero de Starto. Kluba jarkunveno kun akompana programo estas planata por majo.




-padv-

**Svitavy:** Sabate la 18-an de februaro 2017 okazis membrokunveno de Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy. Partoprenis 12 membroj kaj 9 gastoj. En la nomo de ĈEA salutis vicprezidantino Leonarda Chaloupková. Petr Chrdle kiel ĉefdelegito de UEA atentigis pri UEA-kotizoj kaj prezentis novajn librojn de li eldonitajn, el kiuj li donacis po unu ekzemplero al la muzea biblioteko. La kluba prezidantino prezentis la kluban agadon en 2016: la klubanoj kontribuis al 15 aranĝoj, 7x gastigis eksterlandajn vizitantojn kaj 3x ĉeestis aranĝojn kiel gastoj. Estis prezentita ankaŭ plano por 2017. Krom la Muzea Nokto kaj preparo de nova ekspozicio kun programo la klubo preparas por 22.-30.9.2017 Internacian Renkontiĝon de Esperantistoj en Svitavy kaj Bartošovice kun tuttagaj ekskursoj.

Libuše Dvořáková

## E-mental' PRAGO

Kadre de la tradicia Nikolaa-Kristnaska renkontiĝo (26.-28.11.2016) la klubo la unuan fojon engaĝiĝis en la tutŝtata karitata projekto **SKATOLO DE ŜUOJ** (www.krabiceodbot.cz/).

E-mentalanoj sukcesis plenigi entute 20 ŝu-skatolojn per alportitaj ludiloj, libroj, vestaĵoj aŭ bongustaĵoj, kiujn ili pakis kaj disponigis por distribuo al infanoj el malriĉaj familioj.



Omaĝe al la Zamenhofjaro 2017 la klubo komencis serion de unutagaj aranĝoj nomataj **"TOSTO POR ZAMĈJO"**, kiu okazos en diversaj anguloj de Ĉeĥio kaj estos malfermitaj por ĉiuj interesitoj. Planatas almenaŭ 12 renkontiĝoj. Dum ĉiu oni vizitas iun lokon, ligitan iel kun Esperanto kaj en ĝi tostas omaĝe al d-ro Zamenhof. Sekve oni grimpas al la loka turo aŭ belvidejo kaj simbole pendigas grandan E-flagon, kudritan speciale por tiu okazo.




Post komuna tagmanĝo okazas leĝera esperantlingva programo, en kiu bonvenas kontribuoj de la partoprenantoj, kaj promeno.



La 1-a Tosto okazis 21.1. en Hradec Králové, la 2-a 28.1. en Pilseno, la 3-a (dume plej multnombra, kun 20 partoprenantoj, i.a. el EK Šumperk) 18.2. en Litovel kaj la 4-a 4.3. en Ústí n.L. La 5-a Tosto estas planata por 26.3. en Beroun kaj la 6-a por 8.4. (loko ĉi-momente ankoraŭ ne fiksita). Datojn kaj okazlokojn de la sekvaj bv. sekvi en www.e-mental.cz/archiv/category/klubo.

La 25-an de februaro la klubo organizis en Prago tradician aranĝon **BEST-ĜARDENO,** dum kiu oni vizitis i.a. adoptitan pekarion Emička kaj 5 pluajn bestojn, kiujn la klubo finance subtenas.



Kulmina programero estis konkurso pri la plej bona "unubuŝaĵo" (kreita de la partoprenantoj), kompreneble kun antaŭa gustumado.

Inter 17.-19.3. okazis la **11-a BIERo** (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Náchod, kadre de kiu oni i.a. vizitis bierfabrikon Primátor, trarigardis la urbon kaj ekskursis al Dobrošov al la kabano de Jirásek. *-padv-,-vlpi-*

# Antaŭkristnaska renkontiĝo en Vítkovice










La novjaraj porkidoj bakitaj de Jarka Čejková alportu sukcesan jaron 2017!

# Nova junulara Esperanta klubo en Kopřivnice



La 9-an de marto 2017 je la 17-a horo okazis la unua kunveno de junaj esperantistoj en Kopřivnice. Esperanto en Kopřivnice jam en pasinteco havis sian klubon, kies kunfondinto estis Rudolf Zanáška (1907-1954) en la jaro 1927, kiu estis fondinto de esperantistaj kaj skoltaj organizoj. Li fondis ankaŭ Esperantan muzeon en Kopřivnice, kies ekspoziciaĵoj troviĝas en la arkivo de la Urba Muzeo. Unu de ili eĉ troviĝas en la nova skolta centro de Vanaivan. Temas pri iam perdita kaj retrovita Esperanta memorŝtono kun omaĝtabulo al Ludoviko Zamenhof.



La novan klubon VANAIVAN - ESPERANTO en Kopřivnice fondis Pavol Kaščák post interkonsento kun estro de skolta kampo kun sinjoro Kryštof Hyvnar. Sinjoro Hyvnar en la

jaro 2013 estis iniciatinto de renaskiĝo de Esperanta skolta agado en Kopřivnice.



Tuta okazaĵo komenciĝis pro la retrovo de la Esperanta memorŝtono en arbaro super la kampo de Vanaivan. La memorŝtonon ree inaŭguris unu el la unuaj esperantistaj skoltoj, sinjoro František Frýbert el Brno. Ekde tiu ĉi tempo lokanoj esperis je la daŭrigo de Esperanto en Kopřivnice. Iliajn esperojn plenumis Pavol Kaščák, kiu proponis Esperanton lerni ĉi tie. Ili havas tie je dispono novan klubejon kun ekipaĵo. La nova klubo tiel ekfunkciis danke al esperantistoj: Michal Bajcar, Barbora Nytrová, Rostislav Čubok, kaj Anna Gybasová.




Ni deziru al la nova klubo multajn interesantojn kaj emon diskonigi nian komunan lingvon ankaŭ en tiu ĉi parto de Moravio.

*Libuše Dvořáková*

# Ni kondolencas

■ Fine de 2016 forpasis s-ino **Taťjána Krištofová** (84-jara) el Praha

■ La 10-an de januaro 2017 mortis s-ro **Otakar Keclík** (91-jara) el Esperanto-klubo Hranice. Li estis aktiva ano kaj korespondanto kun multaj geamikoj en Esperanta mondo.

■ La 21-an de januaro 2017 mortis **Věra Nečasová** (93-jara) el EK Prostějov

■ La 22-an de januaro 2017 forpasis s-ro **Slavomír Barták** (88-jara) el KE Brno. Li naskiĝis en Koryčany en familio de meblisto en firmo Koryna. La 3-jaran soldatservon li travivis ĉe PTP konstruante aeroporton de Pardubice. Li ne rajtis studi, nur lerni metion. Sian lertecon li uzis por produktado de diversaj memoraĵoj, ekzemple por nia UK Prago 1996. Lastajn jarojn de sia vivo li okupiĝis per esoteriko.





■ La 26-an de februaro 2017 forpasis **Josef Šťastný** (96-jara) el EK Prostějov, gvidanto de oldskoltoj.



■ La 12-an de marto 2017 forpasis **d-ino Danuše Vokáčová** (95-jara) el Olomouc, membrino de la sekcio de nevidantoj.

## Lastmomenta trista informo

Sabate la 18-an de marto 2017 mortis **kardinalo Miloslav Vlk**, kiu junaĝe aktivis en Esperanto-junularo. En la venonta numero ni alportos pli detalan nekrologon.

# Jak platit svazu

### Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Předplatné časopisů

## Nový účet
### zprostředkovatele!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhraďte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč
**La Gazeto:** 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** nur reta versio 440,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4
**Juna Amiko:** 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5, reta versio 200 Kč
**Literatura Foiro:** 1280,- Kč (*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

# Traduku retejon pri Zamenhof-jaro

Se vi volas enĉeĥigi la retejon de UEA okaze de la Zamenhof-jaro, skribu al zamenhofjaro100@gmail.com. Sekvu ankaŭ blogon www.gazetaro.org/eventoj.

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**48. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku**
**(bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117**
**Uzávěrka příštího čísla**: 7.5.2017

---------------------------------------------
-

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**
**48-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 7.5.2017

**ISSN 1212-009X**

# KALENDARO 2017

**2017-04-01** Regiona renkontiĝo en Česká Třebová Info: jk.esperanto@seznam.cz
**2017-04-21/28** Internacia Kongreso de AEH kun lingva seminario en Hodonín ĉe Kunštát
Info: aeh@esperanto-aeh.eu
**2017-04-28-05/01** 4-a CENTREJO Bartošovice
Info http://centrejo.esperanto.cz/
**2017-05-20** Printempa Renkontiĝo en Šumperk
Info: sumperk@esperanto.cz
**2017-06-09/11** Muzea nokto kaj inaŭguro de la nova ekspozicio en Svitavy
Info: muzeo@esperanto.cz
**2017-06-18** Ĉantorio
Info: suchanekj@seznam.cz
**2017-07-16/29** SET Lančov 2
**2017-07-30/08-11** SET Lančov 3
**2017-08-11/13** Renkonto de eksaj tendaranoj – jubilea, la 20a! en Lančov
Info: let.lancov@seznam.cz
**2017-09-22/30** Renkontiĝo en Svitavy
Info: verdastacio@gmail.com
**2017-10-13/15** ĈEA-Konferenco en Šternberk
Info: komitato@esperanto.cz
**2017-12-09** ANKRO Písek
Info: pisek@esperanto.cz
**2017-12-10** Marcipana Kristnasko
Info: svitavy@esperanto.cz

**ARANĜOJ EN NAJBARAJ LANDOJ**
**2017-05-12/14** 36-a Pola E-Kongreso en Bjalistoko
Info:polaj-esperantistoj@yahoogroups.com
**2017-05-16/22** 69a IFEF-kongreso en Colmar, Francio, Info: http://ifef.free.fr
**2017-05-18/21** Interkultura Majrenedevuo en Vroclavo
Info:informado.eo@gmail.com
2017-05-19/21 Tutslovakia E-Renkontiĝo en Partizánske
Info:skef@esperanto.sk
2017-06-2/5 Germana E-Kongreso kaj EEU-Kongreso en Freiburg
www.esperanto.de/dek2017
**2017-08-07/14** KELI-kongreso Zöblitz, Germanio
Info: polnickypavel@seznam.cz




*Membrokunveno en Svitavy (18.2.2017)*



*En la restoracio U skřetů en Prago 7, str. Milady Horákové 52, kie eblas ricevi esperantlingvan menuon, E-mentalanoj renkontis konatan aktoron Jiří Lábus*



*Aranĝo POLUDNICA*
*en Malaltaj Tatroj (foto P. Rybín)*




*Antaŭkristnaska kunveno en Vítkovice*




*Nova klubo ĉe skoltoj en Kopřivnice*



*Esperantumado E-mentala en Litovel*